

ESPERANTO

TRIUMFONTO

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Ardeacon, Paris
J. Gili North, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 155
2. 9. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
Zanon (literaturo)
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso):
Esperanto Triumfonto
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimena kaj unua numero de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Raporto pri la III-a Rumanlanda Kongreso en Timișoara

27.—30. juli 1923.



1. Pastro Ĉe (București), 2. D-ro Jozefo Németh (Timișoara), 3. kolonelo Cojokaru (Besarabio), 4. Kapitano D-ro Josif (București), 5. Kolonelo Schembra (Timișoara), 6. Ĉefinspektoro Iounovits (Timișoara), 7. Franc. Hügel (Timișoara), 8. s-ino Gerstenengst (Timișoara), 9. Eug. Morariu (Cluj), 10. Ser. Fodor (Deva), 11. Direktoro Beran (Cernauc), 12. D-ro Campian (Georgen), 13. Rozalio Vagner (Timișoara), 14. Em. Berger (Timișoara), 15. F-ino Barabas (Targ. Mureș), 16. Dudás (Orsova), 17. Orlov (Turkestano).

De la 27.—30. julio okazis en Timișoara la III-a Rumanlanda Kongreso Esperantista. Nur tiuj, kiuj jam aranĝis kongreson, povas kompreni kiel granda kaj malfacila estas la tasko de kongresa aranĝo. La plejmulto de niaj samideanoj ĝoje aliĝas ĉiujare al la kongreso, pagas sian malaltan kotizajon, aĉetas la rabatitan fervojan bileton, alvenas al la kongreso, entuziasme kantas la himnon, ekskursas, vizitas balon, iomete kritikas, manĝas kaj trinkas, eĉ ne supozante, kiom da penado kaj laboro antaŭfalis la kongreson kaj krome kiom da mono estis necesa por esti la kondiĉojn sub kiuj la aranĝo de kongreso estas ebla. Tiuj, kiuj en tiu ĉi afero jam spertis, scias, ke eĉ unu jaro ne estas tro longa tempo por bone prepari bonan kongreson.

Tia estis la III-a Rumanlanda Kongreso. La bravaj Timișoara Esperantistoj ne pli malmulte ol unu jaro laboris senĉese por sukcesigi sian kongreson. Kaj ili ne vane laboris, ĉar la kongreso bonege sukcesis. Granda parto de la meritoj apartenas al la Esp. Centro Rumana kun s-oj Fischer (L. K.) kaj ĉefdel. S-oj Ĉe kaj sekr. Morariu, kiuj per aktoro de Kronprinco Karol kaj du ministroj Bann kaj Angalescu kiel protektantoj de l' kongreso, per la rabato fervoja (75%) per konstantaj konsiloj kaj propagando multe helpis al la sukcesigo.

Tio, kio faris la kongreson plej imponanta, solena kaj grandioza estis la honora Prezidanto Generalo Gavanescu. Generalo Gavanescu estas unu el la plej eminentaj militestroj de Rumanujo. Li havas grandan influon ĉe la kortego, kaj verŝajne al lia influo oni povas danki, ke la tronheredonto de Rumanujo, Lia princa moŝto Karlo akceptis esti la ĉefprotektanto de la III-a. Generalo Gavanescu estas unu el la plej kleraj kaj humane pensantaj granduloj de Rumanujo. Tial, kiam la 4-an de marto partoprenante publikan paroladon pri Esp. en la urba-konsilantejo de Timișoara, li alidis pri la noblaj celoj de Esp., li tuj aprobis la idealon, komencis lerni Esp., kaj nun je la landa kongreso li honore prezidis ĝin. Kvankam li estis forveturinta en banloko, li interrompis sian someran ripozon kaj alvenis al la solena malfermo, donante al nia kongreso ne forgeseban kaj ne superblan ornamajon. Kiam li post belega rumanlingva parolado ankaŭ en Esp. salutis la kongreson, tiam la tuta kongreso levigante de la seĝoj aplaŭdegis. Cetero laŭ kronologia ordo la kongreso, daŭrinta 4 tagojn, okazis laŭ sekvanta programo:

Unua tago: Akceptado de la kongresanoj en la ornamita stacio helpata de la muzikistaro „Lelkedés“ (Entuziasmo) sub la gvidado de s-ano Dioszeghy. La ĉiam kreskanta nombro de la akceptatoj, la flirantaj verdaj standardoj, la belega sono de nia himno faris belegan kaj bonegan efikon je la publiko. En la stacia akceptejo la gastoj en kelke da minutoj estis grupigitaj de la lertega organizanto kaj kongresa sekretario Francisko Hügel, vic. del. de U. E. A., kaj kondukita per viglaj gesticeronoj al siaj hejmoj. La enloĝigo okazis ankaŭ en plej mallonga tempo dank' al la laboro de la kongresa veturila administranto Berger kaj liaj helpantoj Biber kaj Raupenstrauch, kiuj zorgis, ke je la alveno de la vagon-

aroj sufiĉe da elektraĵ veturiloj, kaleŝoj eĉ aŭtomobiloj estis je dispono. Vespere estis interkonatiga vespermanĝo en la bela kongresejo, kie la prez. de la loka org. kom. D-ro Németh faris salutparoladon al la gekongresanoj, kiun s-anoj Fischer (Bukareŝti) kaj Minkov (Sofia) dankis en la nomo de en- kaj eksterlandanoj. La kongresanoj gaje kunestis ĝis malfruj noktaj horoj.

Je noktmezo deputacio konsistanta el s-anoj Fischer, Kapitano D-ro Josif kaj Kolonelo Cojokaru akceptis ĉe la stacidomo Generalon Gavanescu alvenintan de banloko Herkulano.

Dua tago: Ĝi estis solena tago, festo de unu jaro da fruktodona laboro kun impresoj neforviŝeblaj el la memoro de tiuj, kiuj ĝin partoprenis. Je la 10-a horo antaŭtagmeze la granda kongresejo ornamita per naciaj kaj verdstelaĵ standardoj, ghirlandoj ktp. pleniĝis per la kongresanoj kaj per publiko, en kies vico troviĝis la Ĉefurbestro D-ro Georgieviciu, Subprefekto Bejan, Generalo Badescu k. a. Akurate je la 10-a horo aperis kun akompanantaro Gen. Gavanescu, kiu estis salutata en la antaŭcambro de s-anoj Cojokaru, D-o Josif, Fischer kaj D-ro Németh. Post kelke da minutoj la generalo okupis sian lokon kune kun la ĵus menciitaj s-anoj sur la scenejo, kaj la kongreso malfermiĝis per kanto de nia himno. Generalo Gavanescu salutis la ĉeestantaron kaj laŭ la majstreco de oratoro li faris paroladon pri la graveco de Esp. kiel interkomprenilo de la diversaj nacioj. Li akcentis, kiom ni post la milito devas helpi al la restarigo de la kulturo, je la alproksimigado de la homoj al la homoj. Li esperas, ke Esp. estos la ilo por interpagado kaj interfratigo de la homaro kaj deziras, ke nia laboro kiel eble plej baldaŭ alportu la deziratajn fruktojn. Poste li diris ankaŭ la saman en Esp. lingvo pro kio la tuta publiko levigante lin ovaciegis. D-ro Josif salutis la kronprincon kaj ministrojn kiel protektantojn de la kongreso kaj Gen. Gavanescu por la ofero, alportita de ili por nia kongreso. Li poste konigis al la publiko la signifon kaj celojn de Esp. La publiko atentege aŭskultis la lertan paroladon kaj ĉe la mencio de la nomoj de protektantoj vigle aplaŭdis. Poste D-ro Németh en la nomo de la Kongr. Org. Kom. salutis la altajn protektantojn de la kongr., Generalon Gavanescu, la aŭtoritatojn, la redaktorojn gazetajn, dankante al ili la helpon, kaj faris mallongan rerigardon je la rumanlanda Esp. movado, karakterizante la III-an kiel fundamentan kongreson havante la taskon restarigi R. E. S-on (Rumanlanda Esp. Societo) kaj doni al ĝi statutojn sur kies bazo ĝi povas disvolviĝi. Aplaudis sekvis la paroladon. S-ano Fischer (L. K.), unu

el la sekvanta prezidantaro de l' kongreso. Koloneloj Cojokaru, Schembra, Fischer, Giuglea, D-ro Josif, Iounovits, s-inoj Gerstenengst kaj poŝtino Jörg, D-roj Németh kaj Campian, Bambach kaj Cornica; kaj fine Pastro Ĉe multege aplaŭdita. Sekretarioj F-ino Barabas, s-oj Morariu kaj Hügel.

D-ro Josif en la nomo de l' prezidantaro malfermis la kongreson kaj laŭleĝis la saluttelegramojn alvenintajn. Sekvis la salutparoloj de la urbaj delegitoj, de s-anoj Engelman, Ĉefparohestro Szabo, Orlov, Behron, Vincze, Dudas kaj de la lerta s-ano F-ino Fodor el Deva k. a.

Carman impreson faris la salutparolado de la plej malgranda esp-istino de Timișoara (eble en la tuta mondo), la belega filineto 3-jara de nia pioniro Hügel, la eta Anjo, kaj la salutparoloj de la 12-jara bonparolanta Otto Schojbert, kaj la 13-jara Siegfried Bieg, filo de nia s-ano del. de UEA en Esslingen (Germ.).

Post la 1 h. pm. la malferma kunsido fermiĝis. Posttagmeze estis fotografado en du grupoj, ĉar la nombro de la kongresanoj estis tiel granda (ĉ. 450), ke per unu fojo estis ne eble fotografi ĉiujn (vidu la bildon ĉi-supre). Pos la fotografado la kongresanoj faris komunan promenadon al la banlokoj ĉe la riverbordo. Vespere okazis kinematografia prezentado en la belega somera ĝardeno „Kina“ ĝis la 11 h. nokte.

Tria tago: Dimanĉe je la 9 h. matene la gekongresanoj partoprenis grandmeson en episkopa katedralo kun belega Esp.-lingva prediko, farita de pastro Ĉe. Granda publiko interesiĝante aŭskultis la predikon. S-ano Ĉe, kiel konate, estas tre ŝatata aktiva pioniro de nia movado en Rumanujo. Je la 11 h. komenciĝis la unua laborokunsido sub la gvidado de s-ano Fischer, kiu unue konatigis ĝenerale la projekton de la statutoj, faritaj de la Centro laŭ modelo de Vien. Poste s-ano Giuglea laŭleĝis la projekton, kiun la kongreso en principo akceptis. Posttagmeze oni vizitis la vidindaĵojn de la bela historia ĉefurbo de l' Banato. Vespere je la 9.30 h. komenciĝis la koncerto kun riĉa kaj varia programo pure Esperanta kun Esp. teatraĵoj. La spaco estas tro malvasta por priskribi detale la tutan koncerton. Tial ni nur mencias la plej bonajn prezentadojn, la belegajn kantojn de s-ano Gospodinov (bulgara), la fortepiano-ludo de s-ino Deutsch, la deklamadojn de s-ano Lörsey, la kantojn de la Timișurba Esp. Kantistaro sub gvidado de s-o Levicky kaj la bonege sukcesintan prezentadon de la unuakta Esperantaĵo „Ĉi tie oni parolas Esperante“, aranĝajo de l' fervora s-ano Tyroler, kies merito estas cetero la belsukcesa aranĝado de la tuta koncertprogramo kiel rezultato de longa pacienca laborado.

sterio por Nacia Defendo permesis al la kongresanoj forvojaĝi sen la milita atesto. La Ministerio por Nacia Defendo diskonigis plue la okazon de la XV-a kongreso al ĉiuj partoj de la ĉeĥoslovaka armeo kun la ordono, ke al ĉiu soldato aliĝinta al la XV-a estu donota eksterlice la necesa libera tempo por vizito de la kongreso, kio neniel devas influ la regulan forpormeson. — Sekve de ĉi tiuj faciligoj estis eble ricevi la eksterlandan pasporton post unu duonhoro.

La Ministerio por Eksterlandaj Aferoj dissendis komunikon pri la kongreso al ĉiuj ĉeĥoslovakaj legacioj en eksterlando. La legacioj estis komisiitaj doni al la kongresanoj dezirantaj viziti Ĉeĥoslovakion senprokraste la vizon. En landoj kun meza aŭ malbona valutoj estis ricevebla la vizo por duona prezo. Ĉiuj eksterlandaj kongresanoj rajtis ricevi 35% rabaton sur la ĉeĥoslovakaj fervojoj.

Estus interese ekscii, ĉu iu alia nekongresano lando simile grave taksis la signifon de la internacia manifestado esperantista.

O. G.

La kongresnumeroj

presita en Nürnberg, por la Ruhrkupacio ankoraŭ ne alvenis en Horrem. Malgranda provizo, kiun niaj oficiroj persone kunportis, estas elĉerpita. Kiu ĝis nun ne ricevis unu el la numeroj bonvolu pacienciĝi. Tiuj post alveno ni ekspedas la gazetojn al ĉiu mendinto. Antaŭaj demandoj estas sencelaj.

Pri la iama Ĉekbanko Esperantista.

Rilate al tiu ĉi entrepreno ni ricevis la jenan leteron de s-o Montagu C. Butler, la sekretario de la Brita Esperanto Asocio:

Oni sendube legis en la „British Esperantist“, antaŭ kelkaj monatoj, kelaŭtoroj, kiuj prizorgas la aferojn de la mortinta s-o H. F. Höveler, (la fondinto kaj posedinto de la Ĉekbanko Esperantista) ĝis nun, por diversaj kaŭzoj, ne povis likvidi liajn financajn aferojn, kiuj estis komplikitaj de ĵuraj malfacilaĵoj rezultantaj el la politika situacio en Germanujo.

La sollicitoroj, (Messrs. Marcus & Francis, 47, Broad Street Avenue, London, E. C. 2), metis en „The British Esperantist“ de dato 15. aŭgusto 1923 la jenan anoncon: —

„Oni per tio ĉi avizas, ke ĉiu persono, kiu havas pretendon kontraŭ la havo de Herbert Frederick Höveler, loĝinta 78, South Side, Clapham Common, en la graŝlando Surrey, Anglujo, eksdirektoro de publika kompanio, kiu mortis la 30-an de aŭgusto 1918, estas per ĉi tio petata alsendi al la subskribintoj plenajn sciigojn pri sia pretendo.“

(Dato) 14-an de aŭgusto 1923.

(Subskribo) Marcus kaj Francis, (Sollicitoroj por la administrantino).

Mi do konsilas, ke ĉiu, kiu posedas kreditor aŭ debetito de la Ĉekbanko Esperantista, sciigu je la fino de aŭgusto, aŭ kiel eble plej baldaŭ post tiu dato, al s-oj Marcus kaj Francis, je la adreso suprenita, plenajn detalojn pri la ŝuldo, per letero tre klare kaj legeble skribita (prefere maŝinskribita), kaj sendube la letero siatempe ricevos atenton.

Mi volas aldoni, ke la Brita Esperantista Asocio tute ne havas, kaj neniam havis ian respondecon por la aferoj de la Ĉekbanko, kiu estis privata entrepreno, pri kiu estis respondeca sole s-ro Höveler mem. Mi tamen povas diri, sen akcepto de la respondeco, ke mi kredas, ke ĉiu pruvita ŝuldo de la Ĉekbanko estos plene saldata.“

Aktuala politiko.

Japanujo.

La telegraf-oficejoj raportas el Tokio, ke la japana ĉefministro Kato ĵus mortis.

Turkujo.

Laŭ la „Messaggero“ oni ĵus subskribis en Paris konvencion italan-britan-francan koncerne la fervoĵoj konstruado, al kiu konsentis la turka registaro. La tri landoj dispartigas egalproportie pri la efektiviĝo. La konvencio anstataŭas la antaŭan neefektiviĝintan.

Internacia Sporto.

Naĝado.

La naĝanto Duvalen gajnis la trapason de Paris, naĝante 100 m antaŭ Perel.

Biciklado.

Henri Pellissier gajnis la „Tour de France“, la konatan bicikletan rondveturon ĉirkaŭ Francujo.

Piedpilklo.

Piedpilklo finlanda-hungara.

La 20-an de aŭgusto okazis en Budapeŝto antaŭ grandegnumbra rigardantaro la piedpilklo inter la finlandaj kaj hungaraj ludantoj, kiu finiĝis per venko de la hungaroj 8:0, kvankam antaŭ la finlandanoj ludis bonege.

La lasttempaj venkoj de hungaraj sportistoj en Göteborg, Magdeburg, Paris ĉe vejkurado, naĝo, skermo ktp. pruvus, ke ili ĉi malgranda nacio — simile, kiel en la Esperanta laboro — alifiras la ĝeneralan atenton de la aliaj nacioj. —

Foiroj kaj Ekspozicioj.

Specimena foiro de Napoli.

De la 16-a ĝis 30-a de septembro nunjara okazos en Napoli la 3-a internacia foiro.

„Aŭtuna Semajno de Karlsruhe.“

Laŭ iniciato de la Trafika Unuiĝo de Karlsruhe (Germanujo) estas decidita post preparilo kun la kompetentaj rondoj malgraŭ la malfacilaj ekonomiaj cirkonstancoj aranĝi ankau en la nuna jaro la tiel nomatan „Aŭtunan Semajnon de Karlsruhe.“ Ĝi okazos de la 21. 9.—15. 10. Pluraj ekspozicioj estas projektitaj. La projektitaj agrikultura ekspozicio tamen ne estos aranĝata. Dum la tagoj de la 29. 9.—5. 10. verŝajne okazos speciala teknika foiro.

Foiro de Nijni-Novgorod.

Oni telegrafas el Moskva, ke dum la 2 unuaj tagoj de la foiro oni registris vendojn de entute pli ol 100 milionoj da or-rubloj.

Agrikultura Ekspozicio en Moskva.

La gazetaro sciigas, ke inter la partoprenantoj al la ekspozicio de Moskva la partopreno de germanoj firmaoj estas konsiderinde granda. La plej multo ĝustatempe alvenis. La komitato kalkulas, ke partoprenos sole 190 germanaj entreprenoj. Reprezentataj estos laŭ aligo: Daimler, Krupp, Lanz, Mercedes, Siemens-Schuckert, Junkers, Rheinische Metall A. G., A. E. G. kaj aliaj.

Ekspozicio en Kaunas (Kovno).

„Litova Stelo“ sciigas, ke de la 26. septembro ĝis 2. oktobro okazos Litova Terkultura kaj Industria Ekspozicio en Kaunas.

Detalajn informojn oni ricevas de la administracio: Kaunas, Gedimina gŭ. 7a. Telegramadreso: Kaunas Paroda.

Scienco.

Medicino.

La 19 julio vespere kuenvis en Genova multaj kleraj profesistoj kaj reprezentantoj de Gazetaro kaj inaŭguraciis en Genova sidejon de „La Klinosolenoido“, societo por konstruado kaj disvastigo de elektro-terapeutika aparato je alta tensio kaj al malalta ofteco — kuracilo pri malsanoj ripetigantaj kaj akraj infekta malsanoj, elpensita de D-ro C. Firpo.

D-ro Luizio Martignoni, kiu estas la animo de la entrepreno, la elpensinto, D-ro Firpo, la socia kuracisto, Prof. G. B. Rosciano kaj la administranta direktoro Ernesto Botteri akompanis la invitiitajn dum la vizito en la ĉambro de la Instituto kaj plene klarigis la aparatojn de „klinosolenoido“ en funkcio, montrante per multaj publikaj pri la objekto, la grandan efikon de la aplikajoj en la ripetigantaj malsanoj, en la daŭra artrito, diabeto, podagro, ktp. en la akraj infekta malsanoj: tifa febro, malario ktp.

La aparato jam estis, la unuan fojon, longe eksperimentita de Kliniko de la Speciala Medicinista Patologio, direktata de la klera Prof. Kom. Pangino Liverato kaj kun vere admirindegaj rezultatoj.

La klinosolenoido povas esti aplikata ankau pere de speciala likovrilo al malsanulo, kiu restas hejme. Por funkciado de la aparato, oni utiligas la fluon de elektra lumo, ĝuste aliformigita.

Multaj el la ĉeestintoj, inter kiuj estis kleraj profesoroj kuracistoj, advokatoj, inĝenieroj kaj literaturistoj, havis viglajn, laŭdinajn esprimojn pri la kuraĝa iniciato de D-ro Luizio Martignoni, por la elpensinto D-ro C. Firpo kaj por D-ro G. B. Rosciano, Higiena Direktoro de la Instituto.

Ĉiuj kunvenitoj bondeziris, ke la nova kaj bonon alportanta kuracilo estu disvastigata ne nur en Italujo, sed ankaŭ fremdlande.

La societo plej ol la sidejo en Genova, Piazza di Francia n-o 1 int 2, organizas alian eksperimentan demonstracion, kiu baldaŭ estas aranĝota en Milano. Aliaj ankau sekvos en Roma, Napoli kaj en ĉiuj iliaj urboj.

Cosmo Ricca, Genova.

Parolejo.

199. Ril. al 189.

Mi tre bone komprenas la diferencan inter ŝtataj kaj regionaj lingvoj, aŭ pli bone oni povus diri, idiomoj kaj lingvoj. Mi mem estas lingvistoduma, kaj tre ŝatas la studon de morintoj kaj regionaj lingvoj, sed tion nur por studo, ne por politiko aŭ por malpacigi la popolon. Mi diras „ĉiel nomataj lingvoj“ ĉar verajn lingvojn mi konsideras nur la oficialajn ŝtatajn lingvojn; studatajn kaj parolatajn en la tuta mondo kiel ekz. la anglan, francan, germanan, hispanan, italan ktp. ktp. La aliaj „ĉiel nomataj lingvoj“ por mi estas kvezaŭ dialektoj, ĉar ili estas konataj kaj parolataj nur en la regionoj, same kiel la dialektoj.

Jam oni diras ke en Eŭropo estas tro multe da ŝtatoj post la milito, do kial helpi la disvastigon de regionismo? Se la belgoj kaj svisoj, kiu havas du kaj tri oficialajn lingvojn nomas sin simple „belgoj“ kaj „svisoj“, kial ĉeĥoj, slovakoj, germanoj kaj hungaroj loĝantaj en Ĉeĥoslovakio, posedante nur unu oficialan lingvon ne devas sin nomi „ĉeĥoslovakoj“?

Koncerne la akademio, mi trovas juste, ke ĉiuj lingvoj branĉoj estu reprezentataj; sed friula kaj kataluna estas tute latinidaj lingvoj, do sufiĉe se ni havas italan kaj hispanajn reprezentantojn. Beskoi, kimoj k. a. estas tute apartaj branĉoj. Pro tio ili rajtas havi reprezentanton, kvankam ne estus necese.

S-o Degenkemp skribas ke en Italujo, krom friula, ekzistas nur la itala lingvo, tio estas eraro, ĉar 1/2 milionoj da loĝantoj parolas slavan lingvon, 1/4 milionoj germanan, multaj estas la francoj kaj en Sud-Italio ni trovas ankaŭ albanon. Mi kredas ke ne ekzistas en Eŭropo regno kiu konsistas nur el unu popolo parolanta la saman lingvon. Ni vidas do loĝantojn de sama lando, parolante tute aliajn oficialajn kaj ne parencajn lingvojn, kiuj sin nomas simple laŭ la nomo de la lando, al kiu ili apartenas. Kontraŭe ni vidas loĝantojn de landoj kun nur oficiala lingvo, kaj parolante ne la saman lingvon, sed tre parencajn idiomon, kiuj sin nomas laŭ la regiono kaj ne laŭ la ŝtato, al kiu ili apartenas. Ĉu tio ne estas regionismo? Skribante la hispanoj kaj katalunoj pagas 5 pes., engloj skotoj pagas 2 ŝil. Ĉu tio ne estas regionismo?

Mi ankoraŭ volas atentigi la legantojn, ke mi ne eraras se mi nomas la idiomojn aŭ regionaj lingvoj „ĉiel nomataj lingvoj“: Friula lingvo parolata ankaŭ en Svislando, Italujo kaj en iamaj aŭstri-hungaraj ŝtatoj estas nomata en Svislando

„romanĉa“, en Italio „friula“ kaj en la iamaj aŭstri-hungaraj teritorioj estis nomata „ladina“. Do ĝi eĉ ne posedas propran nomon.

Mi dankas s-on Degenkamp por la klarigoj pri Nederlando kaj Holando, kaj mi konfesis mian nescion pri tio, ke Nederlando ne estas la sama kiel Holando. Sed la kulpuloj estas la nederlandanoj mem. Ili devas klarigi al la mondo ke ilian patrujon oni devas nomi Nederlando kaj ne Holando, kaj ke Holando estas nur 2 provincoj de Nederlando. En la lernejoj de preskaŭ la tuta mondo oni lernas nur „Holando“ kaj la nederlandanoj mem nomas sin „holandanoj“. Ekz.: mi havas sub la okuloj ET n-o 147 kaj legas sub titolo „Gazetlo“: „Holanda Esperantisto, Zutphen“. Ankaŭ en la reklamoj de nederlandaj navigacioj kompanioj, mi ofte legas „Holland America Linie“.

Ril. n-o 190.

Mi dezirus, ke hispana samideano respondu, ĉar li estus pli kompetenta ol mi, sed mi ŝatus, se li estus senparia.

Mi estus dankema, se iu samideano volus sciigi al mi, ĉu ekzistas en Eŭropo lando legata de sama gento kun sama lingvo.

Isella Lugano.

Nota de Red.: Post tiu respondo ni devas fermi tiun ĉi diskuton ne plu povante disponi al ĝi tro da loko.

200. Nova epidemio

En la parolejo de n-o 152 estas skribite tie laŭ mia opinio. Se mi rigardas la vortaron de Christaller (germane Esperante), mi devas skui mian kapon, ĉar al granda nombro da Esp.-vortoj estas aldonitaj malgrandaj signoj, kiuj nomigas la eltrovaĵojn de novaj vortoj. Laŭ mia opinio devas esti nur du signoj en vortaro: unua signo por vortoj de nia majstro Zamenhof kreitaj, dua signo por vortoj per nia lingva komitato aprobitaj. Ĉiujn aliajn kreintojn de vortoj mi konsideras kiel malamikojn kaj perfidulojn de nia lingva afero. Estas klarigeble, ke nia Esperanto baldaŭ devas disfali, se ĉiu verkisto povas eltrovi novajn vortojn, ĉar ĉiu nacio uzos tiujn vortojn, kiuj al li plaĉas plej bone. Do daŭros ne longe, ke Esperanto disfalos en tiom da idiomoj ol ekzistas naciaj lingvoj kaj ke neniu komprenos anojn de alia nacio. Estas senkondicia devo, ke vera Esperantisto neniam aĉetas verkojn, kiuj alportas novajn vortojn, ĉar li unue ja povas ne kompreni la novan privatlignon de la koncernata verkisto kaj due ĉar li subtenus la malrapidan dissolvadon de nia interkomprenrimedo.

B.

201. Ne jam, ne ankoraŭ . . .

Ĉu estas regulaj tiaj esprimoj: „mi ne ankoraŭ vidis“, „kio ne jam aliĝis“, „li ne sin trovas“ ktp.? Alivorte ĉu estas regule metitaj vortojn „jam“, „ankoraŭ“, „sin“ ktp. inter verbo kaj ĝia nea partikulo?

Rezonante eĉ teorie, ni devas konkludi, ke tio estas malregule, ĉar la verbo estas ĉiam tre malvaste kaj infime kunligita kun sia nea partikulo (ne) kaj malligi ilin estas ne nur malbone, sed eĉ tute kontraŭnature. . . . Aliflanke ni irarigardu nian „Fundamenton“ kaj ĉiujn verkojn de Zamenhof: nenie ni trovas esprimojn „ne ankoraŭ“, „ne jam“ ktp. sed ĉiam „ankoraŭ ne“, „jam ne“ ktp. Ekzemploj: „la blanda papero jam ne kuŝas sur la tavolo“ (Ekzerco, § 10); „la infano jam ne ploras“ (ib. § 6); „ĉi tute sin ne gardas“ (§ 18); „vi tute ne estas ĝenila“ (§ 19); „mi ĝin ankoraŭ ne serĉas“ (§ 20); „mi timas, ke ĝi ĝin jam ne trovas“ (§ 20); „la fainta homo ne povis sin levi“ (§ 22); „li ne estas ankoraŭ malgranda“ (§ 35); „ĉi ĉi oni eĉ ne konas la nomon de tiaj societoj“ (Revizoro, p. 44); „mi pli ne havas vivon“ (Hamleto, p. 110); „amiko plu ne mankas“ (ib. 88); „mi la lumon vidu pli ne povu“ (ib. 89).

Estus tre interese ekscii teorian kaj praktikan pravigojn de la kontraŭaj formoj ne jam, ne ankoraŭ ktp. en la similaj esprimoj . . .

A. Andrejev, Tiflis (Georgia).

Malbonvalutuloj!

Bonvolu atenti novajn prezojn: Germanoj 100 000 mk., Hungaroj 300 kr., Poloj 3000 mk., Rusoj 0,20 svls. fr. Anoncoj kostas por Germanoj 500 000 mk.

Humoro.

Sub tiu ĉi rubriko ni en ET n-o 137 (20. 5. 23) represis humoran kritikon pri versaĵo de nia urugvaja kunlaboranto, s-o E. Legrand en Montevideo, aperintan en „Revuo“ n-o 6, koncerne la uzo de l' vorto „stuto“. Kiel ni poste konstatis la eraro okazis eĉ ni. Nia kompositista lernanto Karlo, ĝemante kaj preskaŭ disigante por larmoj, konfesis al ni, ke estis li tiu, kiu korektis tiun ĉi tekston memstare kaj promesis sur ĝenuoj ne plu fari samon. S-o Legrand, kaptante la situation permesas al si respondi pri tio per jenaj humoraĵoj limioj:

Al Verda Kato.

Per unu „gr“ forita — malnataŭ inkaj gutoj —
La paron de flugiloj forperdis miaj ŝtrutoj,
Komense je la gajno de du piedoj pli!
La „stutojn-ĉevalinojn“ mi tiel vi, ne kenas . . .
Ĉu ET korektis la, forprenas kaj aldonas;
Do, spritan mialojn adresus nun al li.

R. Kr.

Bibliografio.

Recenzoj.

Ausführliches Esperanto-Deutsches Wörterbuch (Detala Esperanto-Germana Vortaro) de Karlo Steier, helpita de Prof. P. Christaller. 402 paĝoj. Eldonejo: Verlag E. Rothermel, Gr. Tabarz (Thür.). Karton 4 svls. fr., duonleto bind. 5 sv. fr., por germanoj fundam. prezo 4 resp. 5 gmk. X ŝlosilnombro.

Dume la kartonita e'dono de la libro ne estas tiom alloga, la bindita eldono bone impresas. La vortaro estas tre lerte aranĝita kaj hepos al tiuj, kiuj deziras serĉi vortojn dum la legado de literaturo ktp. Diference al aliaj similaj vortolibroj la ĉefa avantaĝo de la libro de Steier konsistas en tio, ke ĝi ne enhavas sole la radik-formojn de la vortoj kun traduko, sed ankaŭ ĉiujn derivaĵojn. Tio akcelas la encerberigon de la vortoj kaj ilian signifon kaj konformigas al la sperto, ke multaj vortoj ne estas formataj, sed perceptataj kiel uniformaj ideoj. La oficialaj vortoj estas speciale signitaj, same la singlerdeme uzinda neologismoj. Vortoj uzitaj de Zamenhof estas signitaj per Z. La internaciajn vortojn laŭ § 15 de l' fundamento montras C. La libro de Steier indikas kiel unua la arikonon de la germ. vortoj. Same ĝi enhavas por ĉiuj germanaj fremdvortoj bonan germanigon. Tiu ĉi aranĝo kaj la tipografio tre bona diferencigo de la diversaj vortokategoroj igas la libron tre taŭga por eksterlandanoj. Piednotoj pri la elparolo kaj aro da detalaj gramatikaj klarigoj kompletigas la verkaĵon.

Entute la vortolibro estas bona helpilo, ankaŭ por spertaj Esperantistoj kaj devus troviĝi en la biblioteko de ĉiu praktikisto.

R. Kr.

Commercial Conference at Venice. Raporto de la delegito de la Komercio Cambio de Londono, prezentita kaj aprobita per ĝia Komercdukado Komitato la 22. junio 1923. 21-paĝa angla broŝuro enhavanta la oficialan protokolon de la Konferenco de Venezia. Prezo 6 pencej (afankite 7 pencej, por kvantoj favoreprenoj) eldonis British Esp. Association, 17, Hart Street, London W.C.1. Evidente ne estas necese atendi pri la graveco de la enhavo. Ĉiu konscia Esperantisto angla ne devas posedi tiun broŝuron por propagandi en la praktiko.

S.A.T. Jarlibro 1923. 12x17 cm, 205 paĝoj, akirebla nur de membroj de SAT, 23 rue Boyer, Paris XX, kun aldonita sektora karto.

Oni povas gratuli la samideano-laboristojn por tiu tre bone arengita jarlibro. En principo similante al la jarlibro de UEA, la SAT-jarlibro estas specifa laborista almanako. Ĝi enhavas krom statutoj, literaturaj gvidiloj, historiaj datoj el la lab. movado, adresaro de internaciaj laboristaj organizoj, tre legindan statistikan materialon pri la medio laborista kaj adresliston de la SAT-anoj. En aparta ĉapitro la sektora sistemo de SAT estas klarigita. La libro estas nepre rekomendinda al ĉiu intereso. R.Kr.

La Lulilo. Popola teatraĵo en kvar aktoj de D-ro Alois Ausserer. Laŭ deziro de l' aŭtoro esperantigis D-ro Franz Christianell. 72 pĝ. 10 1/2 x 16 cm. Presita kaj eldonita de Val. Höfling, München. Fundam. prezo: 5 gmk. (sic!!); por eksterlando 1,25 sviz. fk.

Ausserer, katolika pastro kaj profesoro de klasikaj lingvoj en ĉefepiskopa seminaro en Aŭstrio ne estas ĉe konata kiel lerta verkisto kaj aŭtoro de tre efikaj popularaĵoj. Li laboras multe por la organizo de katolikaj junularo kaj gazetoj kaj akcentas la valoron de teatro-ludado por la edukado de junuloj. „La Lulilo“ estas unu el liaj plej bonaj kaj edifaj verkoj, sed mi tre bedaŭras, ke la ne tre lerta tradukinto liveris tiun laboron. Mi ĝis nun ne ofte trovis fian stilon kaj tiom da gravegaj gramatikaj eraroj en libro. Por kio la tradukinto ne korektigis sian laboron antaŭ la presigo? Li ekz. edifas domon (anstataŭ konstruas), prenas unun el la kambioj (anst. unu) ktp.; germanismoj abundas, preseraroj svasmas. — Mi efektive ne estas tro severa recenzisto, sed fian tradukon mi ne povas rekomendi al la legantaro internacia. G. Ajul.

Eklumo en la abismo (La Lueur dans l'abime) de Henri Barbusse. Tradukita de Elze. 96 pĝ. 12x18 cm. Eldonita de S. A. T. 1923. Prezo trovebla en la lasta numero de „Sennacia Revuo.“

Konatiĝi la verkojn de la mondfama franco Barbusse estas unu el la celoj de Sennacia Asocio Tutmonda. Same kiel la enhavo de ĉiuj aliaj verkoj de B., ankaŭ ĉi tiu estas tre interesa kaj montras la konkludojn de granda pensulo, kies principoj nepre estas atentindaj. Laŭ lingva vidpunkto ne ĉio plaĉas al mi, sed entute la libro estas bone tradukita. G. Ajul.

Prospektoj k. s.

La Sonorilaraj Koncertoj de Mecheln-Malines (Belgio).

Tre impresa kaj moderna 4-lingva broŝuro pri la mondfamaj sonorilaraj koncertoj de Mecheln-Malines. Krom flandra, franca kaj angla tekstoj unu pario estas dediĉita al Esperanto. Ankaŭ la suskribitoj estas faritaj en Esperanta lingvo. La prospektio montras de novan aplikon praktikan de Esperanto kaj pligrandigas la aron da entreprenoj, uzantaj Esperanton kiel reklamilo. Bedaŭrinde la lingva kvalito de la tekstoj estas malmalbona. Estas rekomendinde, ke dua eldono estu korektata. Entute tamen mi konstatas ĝojigan sukceson.

Bad Reichenhall.

Jus aperis tre bona gvidilo tra tiu banloko, la reĝino de la germanaj alpo-banlokoj. Ĝi estas havebla per la Del. UEA, Fritz Mayerhauser, Salzburgerstrasse 2, Bad Reichenhall.

Gazetoj.

La Interligilo de l' P. T. T., Paris XVIII, aŭgusto. Leginda por poŝtistoj ktp.

La Verda Ombro, Taihoku (Formoso) jun.-jul. en E. kaj japana.

Svenska Arbetar-Esperantisten, Göteborg, aŭgusto, pri Göteborg-ekspozicio, kongreso de S. L. E. A.

La Espero, Stockholm, jun., jul.-aŭg. pri ĵarkunveno de S. E. F.

Esperantista Junularo, Baugé M. el L., julio-aŭg.

Holanda Esperantisto, Zutphen, 85, 18. 8.

Brazilia Esperantisto, Rio de Janeiro, jan.-majo. Pri 7-a Br. Kongr. d. E., Venezia ktp. Ĝojigaj notoj pri progresoj.

La Policisto, Budapeŝto, junio, pri Nürnberg. Tre bona aplikoj praktikaj de E. en ĵui fakoj. Imitinda! (Kun aldonoj: La Poŝtisto — La Fervojoŝto.)

Samideanoj!

En la junularo estas nia espero. Ĝin precipe ni devas varbi por nia ideo, montri al ĝi la valoron de nia movado kaj vekti fiamanieroj la homaran senton.

Ĝis nun mi multe propagandis en lernejoj, li efektivegi la internacian korespondadon de lernantoj kiel ilon al fraŭigo de nacioj. Sed tio ne sufiĉas. Pli efika pruvo de nia forto estos se ni faciligos la vojaĝadon de nia junularo, ĉar vojaĝo estas pli instrua kaj amuza ol vidajokartoj al leroj.

Bedaŭrinde la kostoj de vojaĝo, precipe la lupago por lito en hotelo estas kaj longe ankoraŭ estos tiom altaj, ke ili restas privilegio de riĉuloj.

Tiel mi proponas, ke ni Esperantistoj kun mona kaj morala subteno de oficialaj institucioj (Turistaj kluboj, porfremdulaj societoj, lernejoj oficelaj) iniciatu la fondadon de feraj noktaj loĝejoj por knaboj (eventuale specialajn por knabinoj). Ili konsistus el kelkaj litoj, seĝoj, tabloj kaj lavopelvo.

Inter la delegitoj de UEA troviĝas multaj instruistoj, profesoroj kaj direktoroj de lernejoj, kie oni povus rezervi dum ferioj unu ĉamburon por tiu celo, kompreneble kun permeso de institucio. La nomitaj personoj funkcias kiel inspektaj organoj, la lernejaraj servistoj kiel administrantoj. La nokton loĝejoj rajtus iuj nur dum lernejaraj ferioj studentoj Esperantistaj, eble ankaŭ la skoltaj ne pli aĝaj ol 22 jaroj. Ne devus esti enlastataj junuloj okupantaj jam salajritan postenon, ĉar tio provokus opozicion de hotelistoj.

La rajtigitoj estus sekvantaj: 1. atesto pri ekzameno al Esperanto aŭ noto pri Esperanto sur atesto lerneja. 2. legitimacio de UEA aŭ de la lernejo, kiun la studento vizitas (kun lia fotografiaĵo. 3. pasporito.

Ĉiu knabo estus devigata pagi malaltan sumon po nokto por administrata elpelo kaj li devus submeti sin al statutoj de la pasloĝejo elpeligitaj en la ĉambro. Li ne rajtus resti pli longe ol 2-4 noktoj kaj enskribus sian nomon kaj adreson en la nomaron de la trapasantoj. Pluaj detaloj estus starigitaj laŭ landaj aŭ lokaj kondiĉoj. Pri la ĝenerala regularo zorgus specialaj naciaj delegitoj, UEA kaj ĝia kongreso, kiu elektus komisionon por vojaĝanta junularo.

La adreso, de la pasloĝejoj kun indiko de la templo de malfermo, prezol ktp. estus provizore presita en Jarlibro de UEA post la adreso de delegitoj. Tiu ĉi porĵuata fako povus eble esti poste sendependa, sed la ĉirkonstancoj tion postulas.

En multaj landoj funkcias jam simi aj entreprenoj naciaj, kiuj eble estas favoraj al nia Esperantista junularo. Ĉi tiu la institucio agas laŭ principo de reciprokeco interŝtate. Malfermu al niaj filioj la mondon kun ĝiaj belecoj!

Aligu, vi oferemaj samideanoj, kaj subtenu ĉiamaniere ĉi tiun proponon, kiun oni diskutos, dum la XVII! Sciigu vian opinion kaj konsilon!

Esperantaj gazetoj estas petataj represi ĉi tiun alvokon!

Profesoro Rudolf Fridrich,
Brno, Královo, Pole Ĉeĥoslovakio.

Fervendistoj! Ferfabrikejoj!

Kiu bezonas ilojn kaj maŝinojn por la prilaborado de metaloj?

Malmultekoste kaj bone!

Bonvolu peti informojn de

Walter Freygang, Weinböhle i. Sa.

AL NIAJ LITERATURAMANTOJ ni rekomendas:

	Prezo:
Wiseman, Fabiola	5 sviz. fk. aŭ egalvaloro
Ranco, En Svislando	2,50 „ „
Thurston, La urbo de	2 „ „
bebega sensencaĵo	2 „ „
Hebbel, Gyges kaj	2 „ „
lia ringo	2 „ „

Lippmann k. a., La Vendreda Klubo
ni liveras nur post antaŭa pago. Por
afanko aldonu 10%.

Butin & Jung G. m. b. H.

Esperanto-Eldonejo.

Godesberg (Germanlando): 51. Bahnhofstrasse 50.

Postŝeĉka konto Köln 92036.

Por serioza propagando

havigu al vi la ĵus aperintan artiste
aranĝitan dulingvan broŝuron German-
an-
Esperantan

**Pri la solvo de l' problemoj
de internacia helplingvo por
komerc kaj trafiko**

Oficiala raportoj pri Venezia kun laŭcela
antaŭparolo de Robert Kreuz.

Skribu ankoraŭ hodiaŭ al

**Messamt (Esperanto-fako),
Frankfurt am Main Germanujo.**

Esperanto kun BES-a Adresaro

estas nova kaj feliĉa paro,
kiu amikigas trans monto eĉ maro!

Jus aperis 5-a eldono de „BES-a Adresaro“,
kun portretoj de Esperantistoj! — Prezo 1 sv. fk.

Postula senpagan prospekton de l' eldonanto;

**Bohema Esperanto-Servo, Moravany,
(Boh.), Ĉeĥoslovakio.**

La Esperanto-Cigaredojn

„Tutmonda Esperanto“

„La verda stelo“.

Cigaredomanufakturo Antehmo, Zittau (Saks).

Anonceloj.

KOMERCANTOJ ĉiulandaj! Vi povas disvastigi vian komercalan aferojn, plenumi vian legajn kaj komercajn praktikojn, koncedi reprezentadojn kaj ĉiusepacajn tenejojn favorajn al vi. Plej bonajn kondiĉojn por la samideanoj. Skribu tuj al la Civila kaj Komerc legoĉambro ĉe la advokato kaj prokuroro Arturo Scatà. Via Cavour 59, en Siracusa (Ital.). Oni korespondas en itala, franca kaj Esperanta lingvoj.

ANGLA MONO PAGOTA (GRANDA SUMO) por ekzemplero de OSTRONIERAJ TESTAMENTOJ EN RUSA LINGVO. La Vostokov aŭ faksimilo. Skribu al HIRST, 19 Lion Chambers, Huddersfield, Anglujo.

KELKSEMAJNAN RESTADON de klera familo en Svisujo, litojulo al Francujo, ev. ankaŭ en alia lando deziras samideanojn (germanino el Ĉeĥoslovakio, edzino de kuracisto). Eventuale ŝi rekompence gasligus post la reveno dum kelkaj semajnoj knabino. Detalan sciigojn oni bonvolu direkti al Komerc Instituto „Esperanto“ en Jägerndorf, Ĉeĥoslovakio.

DANA AŬTORO (s-o C. Jacobi, „Bäckehuser“). Holbaek, Danujo), kiu interesiĝas pri klerigo de laboristoj, ekinteresiĝis ankaŭ por Esperanto kaj priensigas ĝin enkondukiĝi ĉe Laborista Vesperiernejo, Samideanoj, kiu bonu speris pri E. inter Laboristoj, bonvolu skribi informige al li — sen demandi lian respondon. Laboremado Deleĝito. [2]

FILATELISTOJ! Kiu sendas al mi 100—1000 poŝtmarkojn sialandajn nedifektajn, ricevos saman kvanton de Hispanujo laŭ Yvert 1923. Gabriel Alomar, Prez. de EKP, str. Valloir, 14 en Palma de Mallorca (Hispan.). [2]

GERMANO 20-jara deziras iri eksterlandon. Oni skribu al E. Klotz, poste restante, Königsberg i. Pr. (Germ.). [2]

Korespondoj kaj Interŝanĝoj.

Fervojoŝta Esperantista Sekcio de Oktobra fervojo (linio Petrograd—Moskvo) en Petrograd (Ruslando), str. Zingovka 62, Klubo je nomo de Lenin, serĉas seriozajn korespondantojn, precipe samprofesiajn. Temoj profesiaj, socialaj, politikaj, etnografaj. Respondo kolektiva. Interŝanĝo de ĵurnaloj. [2]

S-o Marie Martin, en Chemnitz i. Sa. (Germ.), André-str. 5 deziras korespondi kaj interŝanĝi propagandilojn. [2]

S-o Th. R. Sahlberg, Nya varvet, en Göteborg (Sved.) deziras korespondi kun f-inoj en Usono, kaj interŝanĝi fotografiajn. [2]

S-oj B. Hallin kaj J. L. Landin (l. O. G. T.-anoj) en Prästmon (Sved.) deziras interŝanĝi pm., il. pk. kaj lerojn kun ĉiuj landoj. La lasta interŝanĝas ankaŭ gazetojn Esperantistajn. [2]

180 fervojoŝtaloj novuloj de fondita grupo deziras interŝanĝi il. pk., pm. ktp. kun ĉiuj landoj de la tuta mondo. Adreso: Gruposro L. Fied er, Schillerstr. 15, III. en Breslau 15 (Germ.). [4]

Por 5 svisaj frankoj aŭ egalvaloro mi sendas 50 malsamajn em. polajn, germanajn aŭ ĉeĥoslovakajn. Prof. L. Kronenberg, en Bydgoszcz, (Pol.). [2]

Mi korespondas kun la tuta mondo per il. pk. (naturvidoj), interŝanĝas pm. kaj papermonon. Adreso: s-o Stan. Dzius, en Kielce (Pol.) Siano Zagmansk 55, m. l. [4]

Malkaraj ilustritaj poŝtkartoj unuakvalitaj riceveblaj ĉe prof. L. Kronenberg en Bydgoszcz (Pol.). [2]

S-o Wladyslaw Monarszynski, instruisto, Sarnow, p. Koscierzyna (Pol.) serĉas seriozajn gekorespondantojn ĉiulandajn. (Ĉeftemoj: pedagogio, geografo kaj steno-grafio.) [2]

Pograndaj komercistoj — fabrikantoj! Ofertoj dezirataj. H. Sjöding, vendisto de paperajloj kaj muzikaloj. Malm-skillnadsgatan 34, Stockholm. [3]

Policano en Svedujo deziras korespondadon kun amerikano (prefere kun policano). A. L. Hiem, Kungsgatan 8, en Kristinehamn (Svedujo). [2]

S-ino Elizabeth Mitakova, en Moskva, B. Dmitrovka 12, Esperantista Klubo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj. [2]

Ĉiulandaj samideanoj estas petataj sendi propagandilojn kaj Esp. sigelmorkojn al ĉefserĝento Alfred Ursin, ĉe la Prezidanto de la Respubliko Latvio, en Riga-Kastelo. Mi estos tre dankema al ĉiu sendinto. [2]

16-jara studento deziras korespondi per pk., interŝanĝi pm. kaj naciajn gazetojn ilustritajn kun tutmondaj samideanoj. Rudolf Ulbrich, Linz a. D., Tummelplatz 14 (Aŭstrio). [2]

Filatelisto! Por 2 sviz. fr. aŭ egala valoro mi sendas 50 div. malotajn poŝtmarkojn de la liberŝtato Danzig. Interŝanĝas pm. Oskar Köhler, Olsnitz i. Vgl., Bergstr. 5. [2]

S-o Paul Nikitin, en Moskvo, Kalančevskaja ploŝad, 1-1 Krasnoprudskij per d. 1/2, kv. 7 deziras korespondi kun ĉiulandanoj pri libro- kaj gazetpresado; interŝanĝas pk. il. de arkitekturoj, pejzaĝoj (bfl.). [2]

Prof. Miecz. Sygnarski, en Bydgoszcz, Kordeckiego 19 (Pol.) deziras korespondi per il. pk. (bfl.) aŭ leroj pri komercaferoj. Interŝanĝas, aĉetas, vendas pm. kun la tuta mondo. [2]

S-o W. Rose, 70 Brockswood Lane, Welwyn Garden City (Angli.) volas korespondi per leroj aŭ poŝtkartoj kun eksterlandaj gelnantoj (16—18 jaroj). [2]

Esperanta grupo deziras korespondi kun geesperantistoj de la tuta mondo. Skribu al s-o Paulo Renner, en Ober-Wüstegiersdorf i. Schl. 48 (Germ.). [5]

Kial ni vivas? kaj pri similaj temoj deziras korespondi kun la tuta mondo Eduard Augsten en Friedland i. B. 732 (Ĉeĥoslovakio). [2]

Bernardo Orlando, aktoro, en Stuttgart, Kriegsbergstr. 92 (Germ.), interŝanĝas pm. kun la tuta mondo. Kiu sendas 100—1000 sialandajn, ricevos saman kvanton de mia lando. [2]

S-o Otto W. Ferguson, Jeffersonville, Indiana (Usono), deziras interŝanĝi naciajn ĵurnalojn kun ĉiuj landoj escepte centraj eŭropaj. Li ne interŝanĝas pm. [2]

Samideano Rudolf Reeh, Trautenu, Kaiserstr. 3, Bohemujo, interŝanĝas, vendas kaj aĉetas pm. kun la tuta mondo. Fuŝosendaĵoj malakceptataj. [2]

12 valorajn bildkartojn, montantajn la morojn, kostumojn, kantojn de la germanoj sendas kontraŭ 2 sv. fk., 2 sv. kr. 1 guld., 1/2 dol. aŭ samvaloro en registrita letero. Bruno Gahler, Trautenu, Anastasiusgrüngrasse 5 (Ĉeĥoslovakio). [2]

Juna fraŭlino, poŝtĉifistino, deziras korespondi poŝtkarte kun inteligentaj samideanoj de la tuta mondo. F-ino Karin Rosin en Söderhamm, Sved. [5]

S-o Fritz Schulze, Oststr. 155 en Göppersdorf b. Burgstätt (Germ.) deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun la tuta mondo. Mi respondas ĉiam kaj al ĉiuj. [2]

S-o Erwin Fiss, Bärenstein, Bez. Dresden, Schlossmühle (Germ.), deziras interŝanĝi pm., pk. kaj papermonon kun la tuta mondo. [2]

S-o Isaj Dratwer, Warszawa, Muranowska 26/32 (Polujo), elsendas por 1 sviz. fk. aŭ egalvaloro 15 sovietajn kaj 10 polajn poŝtmarkojn. Ĉiuj bonkvalitaj, diversaj, nedifektaj. Ankaŭ interŝanĝas pm. kaj (bfl.) kaj korespondas. [2]

Kiu helpas al studento de hindustania lingvo per korespondado pri tiu lingvo kaj pri hindaj literaturaj kaj popolkrimoj? Skribu, nomadus ian al mi servon, kiam mi povos maviĉe fari, al s-o Reggie Hope, 735 Broadway W., Vancouver, B. C. Kanado. — Urdu-Zabân-Men-Likhiye. [2]

Bonkoraj Kuracistoj! Mi malsaniĝis antaŭ 4 jaroj de spin-kurbiĝo, sed ĝis nun mi ankoraŭ ne resaniĝis. Laŭ la konsiloj de la tieaj kuracistoj mi portis gipskorseton dum 4 monatoj, sed sen utilo, ĉar laŭ ilia opinio la kurbiĝo estas tre malsupre. Se iu el via scias certan kuracilon aŭ bonajn konsilojn, mi petegas vian helpon al mi. Aleksander Parov, Miladinova 21, Rusukio (Bulg.). [2]

Poŝtmarkojn el orientaj landoj vi plej malkare aĉetas ĉe Eldonejo „Esperantista Voĉo“, en Jasio (Pollando). Ni sendas pm.-elektojn kontraŭ bonaj referencoj aŭ mondeporno. Interŝanĝas pogrando; fuŝosendaĵoj malakceptataj. [4]

Mi deziras korespondon kun seriozaj kaj idealaj fraŭlinoj, inter 18—20 jaroj, de la tuta mondo, per let. kaj il. pk. pri interesaj kaj sciencaj temoj, Esperante aŭ angle. Robert Pandikow, Peilbott 11, Wilhelmshaven (Germ.). [5]